

Ora Ĵurnalo

Numero 28, Aprilo 2020



Al la tuta mondo:

Bonvenon al la verda Gotenburgo!

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo	2	Nizostrigo – hokuggla.....	18
Pri Ora Ĵurnalo	2	Kavat estas 31-jara ĉevalo	19
Espe-Porko meditas	3	Azenoj en Nepalo	22
Pasko	4	Adam, 8-jara, rakontas pri Genki, sia hundo	24
Flugadi, ho-o, kaj kanti ho-o-o-o	4	Alicia, trovita kato	26
Pri la kronviruso: El la gazeto Aftonbladet	5	Printempaj hajkoj	27
Pandemioj ŝajne komenciĝas	5	Lenke Szász: El eseo de György Bálint	28
La plej feliĉa lando – Finnlando	6	Iksodo – eta sed danĝera besteto	28
Orvokki betyder "viol" på finska	6	Kokcinelo.....	29
El Facebook de Fransoaso Oazo	7	Jen poemo pri kokcinelo de Julio Baghy	29
Råssö, poemo-prozema de Folke Wedlin	8	Hej Kokcinelo!.....	29
Spegulo Homarana	9	Kokcinelo – magia insekto	30
Jen Dormas La Leon' – The Lion Sleeps Tonight	9	"Granatbabilaĵoj"	30
"Mia Testudo" de Britta Rehm	10	Bamse kaj liaj amikoj.....	30
Pri Britta Rehm	10	Fritiof Nilsson kaj la restoracio	
La baleno de Malm.....	12	Henriksberg.....	31
La forkurinta porko	12	Soleo Walewska.....	32
Mia hundo Tina	13	Paskaj salutoj de Lucina kaj Marek	34
Marabou kaj Cloetta	13	El letero de Elwira Twardowska	34
El la vivo en bieno en Dalsland.....	15	El Samarkando venis jena pasksaluto	35
La virbovo Abil	15	Berättelser i backspegeln.....	36
La korniko Jillis – Kråkan Jillis	17	Himla-getterna	36

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo subtene por la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68. Monkontribuoj bonvenaj al pĝ 436 12–1.


Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!






Espe-Porko meditas



- ☆ Ĉu oni ne plu trompas unu la alian en la 1a de aprilo? Mi ne trovis "aprilan trompon" nek en la ĉiutagaj gazetoj, nek en la televido. En kronvirusaj tempoj eble la tradicio foriĝas. Ne gravas al mi.
- ☆ La tago de la Mondo estos celebrata la 22an de aprilo, la tago de la mondlibro en la 23a de aprilo kaj la Valpurga antaŭvespero la 30an de aprilo.
- ☆ La kronviruso igas nin neokazigi la printempajn Esperanto-Sabatojn kaj la someran kurson en Gotenburgo. Interreto fariĝas pli grava, kiam oni reale ne povas renkontiĝi. Mi legis la Malmö-Kopenhagan gazeton **Ponto**, kiu citas informon de www.uea.facila.org: *La Akademio de Esperanto diskutis, kiel nomi tiun viruson en Esperanto. La plejmulto estis egale dividita inter kronviruso kaj koron-viruso. La medicinistoj, aliflanke, preferis la teknikan terminon koronaviruso. Finfine, do, la Akademio ne rekomendis unu el la du formoj, sed anoncis, ke ambaŭ estas uzablaj.*
- ☆ Ĉi tiu numero temas pri "Bestoj kaj Naturo". Bestoj – grandaj kaj malgrandaj de eta iksodo al granda virbovo. De eta kokcinelo al ĉevalo en Skotio kaj azenoj en Himalajo.
- ☆ Folke Wedlin logas nin viziti la insulon Rössö per sia poemo. Alia poeto estas J.H. Erkkö kun Spegulo Homarana, sed li

ne skribis en esperanto. Vilho Setälä tradukis.

- ☆ Mi pensas ke homoj devas ŝerci kiam estas malfacilaj tempoj por bone transvivi. En Turkmenistano la vorto "kronviruso" estas malpermesita. Se oni elparolas ĝin, oni riskas esti kaptita kaj kondamnita. Ankaŭ el sanbroŝuroj oni deprenis la vorton kronviruso. Ĉu la registaro pensas ke la pandemio foriros kun la forigo de la vorto? /Siv



Jen bildo el Facebook de Hokan Lundberg, kiu siavice ricevis ĝin de Aaron Chapman, Vancouver: "Aŭdis la tuson de la najbaro".

☞ Bengt Olof Åradsson meddelar att nästa **La Espero** kommer ut först efter SEF:s kongress. ☞



Pasko

Nia vorto Pasko devenas de la juda **Pesach**, kiu signifas preterpasi, memoro de la eliro de la judoj el Egiptio. Oni devis "preterpasi" rapide ĉar ne estis tempo atendi ke la pano estis fermentita. Nefermentitan panon oni nomis **maco**.

La latina nomo de pasko estas **paschae**. En francparolantaj landoj oni ofte donis varianton de tiu vorto – **Pascal** – al knaboj, naskitaj dum pasko.

En la **rus-ortodoksa tradicio** oni celebras **noktmezan meson**. Unue la preĝejo estas tute malhela, sed kiam la horloĝo montras la 12an, la pastro eklumigas kandelon. Poste la preĝeja komunumo sekvas lin kaj en vico eklumigas kandelojn. Kiam ĉiuj havas kandelojn oni staras en rondo brakumante unu la alian memore al la releviĝo de Kristo.

Svedaj tradicioj:

Kial paskaj sorĉistinoj? Estas ligilo al la procesoj kontraŭ sorĉistinoj en la 17a jarcento. La Diablo invitis sorĉistinojn al

Blåkulla. Laŭ popola tradicio dum Sankta Ĵaŭdo kiam Kristo estis kondamnita, ĉiuj malbonaj fortoj estis liberaj. Oni ekbruligis fajron kaj pafis al la imagitaj sorĉistinoj.

Kial paska vergaĵo? Laŭ la popola tradicio oni vipis unu la alian dum la Sankta Vendredo por memorigi pri la sufero de Kristo.

Kial la paska virkoko? Kristo antaŭdiris ke trifoje antaŭ la matena kokeriko Petro malkonfesos lin.

Kial paskaj leporoj? Leporoj estis simbolo de fekundeco dum pagana printempa celeburo. Dum kristana tempo la paska leporo unue aperis en Germanio dum la 17a jarcento. Elmigrintaj germanoj kunportis la tradicion al Usono. Nur komence de la 20a jarcento la paska leporo venis al Danio kaj poste al tuta Skandinavio.

Kial kiom da ovoj? Dum la 40-taga fasto oni ne devis manĝi ovojn. Do, estis amaso da ovoj je pasko kaj oni havis ovo-feston.

Fonto: Lokalpressen i Lerum 5 april 2020 /Siv



Flugadi, ho-o, kaj kanti ho-o-o-o...

de Emanuel Rovere, Italio

Inga trovis la ligilon kaj sendis ĝin en "blua lundo" (6 aprilo) En blu' farbita de blu' (Flugadi) – Verde/Modugno – esperantigo: Emanuele Rovere. Manŭel kantas en esperanto la famegan, italan kanton "Volare", kies vera titolo estas "Nel blu dipinto di blu": <https://www.youtube.com/watch?v=MUPCntuJx04>

Pri la kronviruso: El la gazeto Aftonbladet



La bildo prezentas Anders Tegnell de "Folkhälso-institutet" (La Instituto por popolsano).


En Facebook oni starigis la grupon: "Defendu Anders Tegnell!"

Homoj volas havi klarajn instruadojn: Faru ĉi tiel! Ne faru tiele! Oni postulas ke li povu antaŭdiri la estontecon. Oni plendas pri tio ke "oni ne rapide havis pli striktajn regulojn" – "Kial oni ne fermis la bazlernejojn kiel en Danio kaj Norvegio?"... k.t.p. sed la societo ja devas funkcii.

Anders Tegnell lasas al la homoj mem pensi. Li informas pri tio, kion la esploristoj diras kaj raportas la nombron de mortintoj kaj kiom da personoj kiuj nun estas en hospitalo kun spiraparatoj.

Laŭ Anders Tegnell gravas ke ne tro multaj malsaniĝas samtempe ĉar la hospitaloj ne havas kapablecon zorgi pri amaso da pacientoj. "Gardu personojn kiuj havas pli ol 70 jarojn kaj/aŭ havas alian malsanon!"

La plejparto havas konfidon al la aŭtoritatoj kaj respektas la malmultajn regulojn. La politikistoj ĉesas ataki unu la aliajn kaj pensas ke nun oni nepre kunlaboru! /Siv



ENOUGH IS ENOUGH



LEAVE US ALONE

De Daniel Lundberg, Facebook

Pandemioj ŝajne komenciĝas per bestbredado aŭ bestfoiroj aŭ per sovaĝaj bestoj en kontakto kun "dombestoj". /Siv



De Pascale Salmon, Facebook

La plej feliĉa lando – Finnlando



Antaŭ tri jaroj oni diris ke Danio estas la plej feliĉa lando en la mondo, sed laŭ Göteborgs-Posten (21 marto) nun estas Finnlando. Danio estas la dua. La fonto estas raporto de UN: World Happiness Report 2020.

Jen la listo: 1. Finnlando 2. Danio 3. Svisio 4. Islando 5. Norvegio 6. Nederlando 7. Svedio 8. Novzelando 9. Luksemburgo 10. Aŭstrio 11. Kanado 12. Aŭstralio 13. Britujo 14. Israelo 15. Costa Rika 16. Irlando 17. Germanio 18. Usono 19. Ĉeĥio 20. Belgio

La finna filozofa **Frank Martela** pensas ke la bona rezulto dependas de la granda konfido de la finnoj al aliaj homoj kaj al la aŭtoritatoj. En la nuna kronvirusa eksplodo, socioj kun alta grado de konfido estas pli flekseblaj kaj homoj helpas unu la aliajn por pli facile travivi la krizon. /Siv

Orvokki betyder "viol" på finska

– Soile Lingman rakontas



Min syster Orvokki är död. Hon drog sitt sista andetag kl. 03.45 den 22 mars på Kalmar sjukhus. Anja hade vakat i fyra dygn hos henne och var med till slutet. Den sista veckan hade man röntgat hjärta, njurar och huvud men alla organ var slut efter nästan 88 år. När alla smärtor och ångestkänslor hade bekämpats, kunde Orvokki lämna jordelivet i närvaro av sin kära dotter Anja.



Jag hade tänkt mig att tillbringa påsklovet hos Orvokki, "violen" som Evy kallade henne. Men så kom Döden och hans medhjälpare Corona emellan. Någon vanlig begravningsceremoni kan det inte bli då vi alla avråds från resor under nuvarande förhållanden. Anja planerar en minnesstund med urna i Elavi kapell i Borgholm den 3 eller 5 juni. 3 juni har Orvokki namnsdag enligt finsk almanacka.

Förhoppningsvis kan vi då ta oss till Öland.

Barnbarnen Björn från Oslo, Martin från Boden och Niklas från Linköping och jag från Stockholm. Den barnrika släkten för övrigt behöver ju inte vara med.

Så går det ena finska krigsbarnet efter det andra ur tiden. Orvokki och jag startade den första Krigsbarnsföreningen i Halland när vi i augusti 1991 sammankallade till ett möte i hennes stuga i Hästhagen. Till hösten valdes en styrelse för Väst kust-Föreningen i Varbergs Folkets Hus. I den styrelsen ingick Timo Takanen, polisen i Varberg som är far till Anna Takanen.

I februari 1992 bildades Stockholms-Föreningen med mig, Soile, som ordförande. Vi for i grupp med tåget till Borlänge samma vår för att starta Riksförbundet Finska Krigsbarn, RFK. Vi var många och entusiasmen var stor. Det bildades lokalföreningar i hela Sverige och

motsvarande organisationer i Finland. Vi hade samtalsgrupper, möten, resor till Finland för att utbyta tankar och erfarenheter. Det skrevs böcker och tidningsartiklar, gavs intervjuer, gjordes TV-inslag. Till Riksförbundets årsmöte varje år i maj kom alltid en busslast f.d. krigsbarn från Finland. Vi kände oss som en stor familj av systrar och bröder. När monumentet vid gränsen Haparanda-Torneå skulle invigas reste krigsbarnen med ett specialtåg från Helsingfors till Torneå. Invigningen gjordes i närvaro av Kung Carl-Gustaf och President Tarja Halonen.

Men vi har blivit nästan 30 år äldre än 1991. Riksförbundet lades ner 2017.

Lokalföreningarna har successivt försvunnit. Endast Göteborgsföreningen, GFK, finns kvar, tack vare dess entusiastiska ordförande Kiello Bengtsson. Det var Orvokki Lingman och Kajsa Åström som 1992 drog i gång GFK. Många av oss som nu känner oss vilsna och ensamma utan våra "syskon" har gått med i GFK.

Måtte den få leva länge än, det budskapet vill jag ge till min syster Orvokki inför hennes 88-årsdag den 1 juni 2020.


Måtte Coronan ha bekämpats till dess, så att vi kan få ännu en vår och sommar medan vi orkar njuta av den.

Soile Lingman Stockholm 5.4.2020



El Facebook de Fransoaso Oazo. Ŝi vizitis nin en Gotenburgo antaŭ multaj jaroj. Tiam ni ekskursis al Vrångö, Fransoaso, Inga kaj mi. /Siv

Råssö, poemo-prozema de Folke Wedlin



RÅSSÖ

Tidig morgon
fjädermoln
himlen löftesrikt blå
ängstrand
liten flik med snäcksand:
ostronört
Bulldozer kommer
DEVELOPMENT INT'L
Stannar
föraren backar
kommer inte vidare
han kliar sig i huvudet
går därifrån
Jag går fram och tittar
Ser i förstone inget särskilt
Sedan upptäcker jag
en liten grön syrsa
Den spelar så fint

Jag tar fram min lupp
Det tycks stå något
på vingarna:
E-O
Märkligt...!

RÅSSÖ

Frumatene
cirusoj someraj
ĉielo promese blua
herbeja strando
pinteto kun konkka sablo
Mertensia maritima
Alvenas buldozo
DEVELOPMENT INT'L
Ĝi haltas
la kondukisto retroveturas
nekapabla foriri
gratas sian kapon
foriras kolorege.
Mi antaŭeniras, rigardas, serĉas
Unue mi nenion vidas
Poste mi malkovras
verdan akrideton
Bele ĝi ludas

Mi elprenas mian lupeon
Ŝajne estas skribita io
sur ĝiaj flugiloj:
E-O
Strangege...!

Spegulo Homarana

de J.H.Erkko 1946... en Esperanto de Vilho Setälä, Finnlando (El la biblioteko de Stannum)

1.

La hereditan, netrudan kaj liberan religion
disvolvu el profundo de via koro
en fruktoportan arbon de vivo
Serĉu la veron de l' vivo




2.

Sendependeco estas libero;
ĝi estas la radiko de ĉia libereco,
la trunko ĝis la supro de via evoluo.
Fosu vian propran sulkon
Mem vin ĉiam subtenante.
Kiel arbo belstatura
Vin al propra trunk' apogu.



3.

Kiel en arbar' formiko
Serĉu la komunan bonon
La socion supren levu!
Kune remu en konsento
Homan komunan boaton
Celon vi certe atingos.
Vanta kverelo sen kaŭzo
ĝuo de menso malnobla.




Jen Dormas La Leon' – The Lion Sleeps Tonight

en Esperanto – ĉe la familio
Aleksander, Kanado.

Traduko kaj kant-aranĝo de Tomaso
kaj la familio Alexander.

Lottie Ericson sendis ĉi tiun
esperanto-version de The lion sleeps

tonight: <https://www.youtube.com/watch?v=2tqnGL-fn6s>



”Mia Testudo” de Britta Rehm



el la tekstoj de la iama Merkreda studogrupo, gvidita de Aira Kankkunen. Aira kutimis kolekti la eseojn de la partoprenantoj kaj fari libretojn el ili. Jen rakonto de Britta Rehm.

”Dum mia frua infaneco mi ricevis de mia onklo eksterordinaran donacon, etan testudon. La onklo estis maristo, kaj tiutempe oni ofte kunportis hejmen testudojn por doni ilin kiel donacojn al iu aŭ al iuj.

Mi mem ne memoras ĉion, sed onidire mi ne ĉiam kondukis bone al mia testudokamarado, kiu cetere havis la nomon Adel. Se ĝi ekzemple baris mian vojon sur la kuireja planko, mi forŝovis ĝin tiel forte, ke ĝia karapaco laŭte koliziis kontraŭ la muro, kaj mi diris akre:

– Flanken, for!

Mi havis grandan ludilkeston sub nia kuireja tablo. Se mi ne erare memoras, la testudo almenaŭ de tempo al tempo loĝis inter la ludiloj.

Bedaŭrinde mia ludkamarado havis tragikan vivfinon. Foje ni devis ordigi apartan sanigon por nia loĝejo. Kvankam mia patrino ĉiam purigis la loĝejon, bestetoj troviĝis malantaŭ la pentraĵoj. Tiel ja kutimis esti en la malnovaj domoj dum mia infaneco. Dum la sanigado homoj ne rajtis esti en la domo. Oni petis, ke mia patrino kune kun sia knabineto eliru el la loĝejo – por kiom longan tempon, tion mi ne memoras. Kompreneble tio estis necesa. Ni promenis en la najbara Kastelarbaro (Slottsskogen). Sed – bedaŭrinde – ni tute forgesis la testudon!!!

Hejmveninte ni trovis ĝin morta, la kapo pendante ekster la karapaco. Kia malĝojego!

Mia patro kaj mi iris al Slottsskogen kaj enterigis la kompatindan testudon en ŝuokartono sub arbon. Eble mi eĉ nun povus trovi ĝian tombolokon, almenaŭ la areon.”

Pri Britta Rehm

Britta nun pasis sian 90an naskiĝtagon. Tamen ŝi jam en 2019 celebris ĝin en sia hejmo – por esti certa ke ŝi povus. Kaj nun – kiam estas ŝia vera naskiĝtago, ŝi troviĝas en maljunulejo kaj ne certe memoras kiu estas kiu, se ni vizitus ŝin.

Britta havis specialan ”rolon” en la Esperanto-Societo de Gotenburgo. Oni ridetis, kiam ŝi venis, ĉar oni atendis ke ŝi kiel kutime diros ion rapidsprite. Dum kelkaj jaroj ŝi estis la kasisto en la gotenburga e-klubo kaj havis bonan kontrolon de la membroj. Ofte ŝi kune kun Aino debatis ion kaj donis specon de teatraĵo por ni. Ili diris trafrespondojn unu al la alia. Ĉu ili kverelis? Tute ne, sed ambaŭ ludis per la lingvo – kaj la sveda, kaj esperanto.



En Masthuggsliden 2009. Britta staranta en la mezo.



Ĉe Klippan en 2011. Denove Britta estas en la mezo.



Britta kun hispana trubaduro en Tycho Brahes gata 2011.



En Kvarnabo 2012.



En Hökälla 2013.



Naskiĝtago ĉe Britta en 2019.

La baleno de Malm

En la aŭtuno dum la jaro 1865, la muzea intendanto August Wilhelm Malm havas strangan ideon. La ĵurnalo "Göteborgs Handels- och Sjöfartstidning" skribis la 31:an de oktobro:

Stranga kapto je pasinta dimanĉo ĉe la 9.00 h. Du fiŝistoj, Carl Hansson kaj Olof Larsson el Backa en Frölunda paroĥo, vidis balenon kiu surfundiĝis. Per boato la du fiŝistoj proksimigis la balenon kaj mortigis ĝin.

La ĵurnalo GP skribis la 4:an de novembro:

"Estas io putra koncerne monstron". Certe estis la Gotenburga ĵurnalisto "Storwitziren" Aron Jonasson, kiu skribis. Troviĝas aliaj amuzaj formuloj en la artikolo la 4:an de novembro. La konkludo estis ke la odoro ĉirkaŭ la monstro estis terura.

James Dickson aĉetis la mortan monstron por la Gotenburga muzeo kaj la baleno estis konservita. La baleno estis juna balenoptero,




kaj ĝi estis 16 416 mm longa. La muzea intendanto nomis ĝin "Carolinæ", la nomo de lia edzino.

Dum la jaroj la baleno estis multe vojaĝinta, tien kaj reen en ekspozicioj.

Se vi havas deziron vidi la monstron hodiaŭ, ĝi troviĝas en la Gotenburga naturhistoria muzeo. Sed mi dubas pri tio pro la odoro...

/ Ingegerd

La forkurinta porko



– Mi pensas ke mi estas frenezulo, diris la sendito kiu venis kun dokumentoj al mi.

– Kial, mi respondis.

– Rozkolora porko kuras antaŭ mia aŭto, mi estas vere konfuzita!

– Ĉu ekzistas rozkoloraj porkoj en la arbaro, li daŭrigis.

Mi klarigis ke tiu porko estis naskiĝdonaco al mia najbaro, Mikael.

La sendito donis al mi miajn dokumentojn kaj foriris. Mi telefonis al alia najbaro Lennart, kiu estas la prezidanto de voja

societo kaj li venis. Ni katenis la porkon per ŝnuro kaj la prezidanto tiris kaj mi ekpuŝis de malantaŭ. Terure laborema tasko, ĉar la porko strebis tien kaj reen. Ekster la vojo kaj sur la vojo...

Poste ni alvenis al la domo de Mikael kaj li rampis de sub sia aŭto.

Mikael rampis antaŭen de sub la aŭto kaj estis nun staranta antaŭ ni kaj la porko.

– Ĉu tiu diablo estis forkurinta, li ekkriis.

Mikael havis nenion scieton pri la aventuroj de la diabla porko. / Ingegerd


Mia hundo Tina

de Christin Granat

Tina estis mia unua hundo kaj la raso estas Malinois. Tina komence estis la hundo de mia patrino. Tina estis ĉiam infangardanto por Anneli kaj mi en la ĝardeno, kiam ni estis infanoj. Ŝi amis pilkojn. Kiam kelkaj el ni infanoj ludis kun pilkoj, Tina tuj volis partopreni kaj "ludi". Sed kiam ŝi "ludis" la pilkoj rompiĝis.

Ŝi havis talenton, kaj tio estis kanti je niaj naskiĝtagoj: "Ja må hon leva." Tina estis "duopatrino" por Tin-Tin.

Tina amis homojn. Ŝi estis afabla, bonvolema kaj agrabla.



Marabou kaj Cloetta

de Christin Granat

Marabou kaj Cloetta – tiuj du kunikloj estas malhelbrunaj. Tial ni nomis ilin de du ĉokoladmarkoj. Ili ne similis al siaj gepatroj Holly kaj Hoppsan. Ambaŭ estis sufiĉe malgrandaj. Bedaŭrinde Cloetta forpasis de ni la pasintan Kristvesperon. Ĝi havis kanceron kaj estis grave malsana dum sufiĉe longa tempo. La lastan fojon kiam mi tenis ĝin, mi

sentis, ke ĝi malvarmiĝis kaj jam komencis perdi felon.

Marabou vivas hodiaŭ. Ĝi estas mia propra eta kuniklo. Mi ĉiam levas ĝin, kiam mi venas al la stalo. Plej rimarkinde estas, ke ĝi preskaŭ neniam volas suben en la kaĝon denove. Marabou ofte volas ĝentile frapeti mian

vizaĝon. Pinĉi ĝi ankaŭ volas per siaj ungoj. Sed plej ofte ĝi nur volas brakumi kaj karesi, estas mojose, mi pensas.

Antaŭ kelkaj semajnoj ĝi ĵetis splitojn ene en mian puloveron. Doloris, sed ĝi ridetis al mi.

Plej ofte, kiam ni venas por nutri ĝin, ĝi volas kunhelpi verŝi la nutraĵon en la bovlon, tirante la mezurkruĉeton en sian direkton.

Antaŭ ol Cloetta ekhavis kanceron, ĝi loĝis kune kun Titti, nia hela kuniklo. Ili tre bone sentis sin kune. La "plej aĝa fratino Titti" ĉiam estis tiom protekta kontraŭ Cloetta, ĉiam kuŝis apud ĝi kaj ili amuziĝis kune.

Male Marabou neniam sentis sin bone loĝante kune kun iu de niaj kunikloj. Ĝi nur batis ilin se ĝi venus en ilian proksimecon.


Pasintan printempon ni iris kun Marabou al veterinaro en "Blå Stjärnan" (Blua Stelo – besthospitalo). Ni estis tie, ĉar okulo de Marabou larmis. Ni hejmeniris kun kvar diversaj medikamentoj kaj okulgutoj.

Patro kaj mi donis al Marabou medikamentojn kaj okulgutojn kvarfoje tage. Marabou estis bravulo kaj nur ĝemis foje. Post tiuj dek tagoj la larmanta okulo saniĝis.

Nun la problemo estas reveninta, bedaŭrinde. Sed mi ricevis komplimenton de la veterinaro, ŝi diris ke malofte ili havas tiel bonkonduitan beston en la kliniko. Ĝi estis trankvila kaj bona ankaŭ tie. Marabou permesis al ili palpi kaj turni ĝin, kiel ili volis, kaj ne estis iuj problemoj.

Marabou havas kvar jarojn hodiaŭ.

Kiam estis esperanto-renkontiĝo ĉi tie la pasintan someron, nia amikino Elwira el Pollando tenis Marabouon al sia sino. Mia bokuzino Nina kaj ŝia filino Amanda vizitis nin



Titti.

aŭtune. Ankaŭ Amanda povis teni Marabouon al sia sino.


Kiam Cloetta troviĝis kaj loĝis kune kun Titti okazis ke la kunikloj volis kunhelpi kiam ni estis donantaj al ili nutraĵon. Ili prenis la bovlon ĉe ambaŭ flankoj kaj portis ĝin en sian kaĝon. Sammy ofte volis kunesti, kiam mi brosis Marabouon aŭ kiam ĝi ricevis okulgutojn. La hundo bone distris Marabouon, starante antaŭ ĝi, ĝoje kaj ĝentile bojante, por ke Marabou ne pensu ke ĝi havos

malagrablajn medikamentojn aŭ estos brositita, kio memklare estis malagrabla por ĝi. Kiam Marabou loĝis en kaĝo ekster la fako, mi kunmetis Sammy, ĉiun fojon kiam ni iris al la stalo, ĉar Sammy kaj Marabou tre ŝatis unu la alian. Ili povis stari babilante ambaŭ siaflanke de la kaĝkrado dum kelkaj minutoj. Estis agrable vidi ke Sammy kaj Marabou ĉiam estis tiom amemaj unu al la alia.

Ambaŭ Sammy kaj Stina (mia kato) mi nomis "Miaj infanoj", ĉar mi ne povas havi proprajn.

Ĝis la revido!

Christin



Stina kaj Sammy.

El la vivo en bieno en Dalsland



Åke kaj Ingrid Vallin.

La virbovo Abil – Åke rakontas

Mi elkreskis en bieno en Bohuslando.

Ni havis bovinojn, kokojn, porkojn kaj virbovon, kiun ni nomis Abil.

Abil ĉiam libere iris en la bieno, ne eblis havi lin en la ĉirkaŭfermita paŝtejo.

Tjuren Abil – Åke berättar

Jag växte upp på en bondgård i Dalsland.

Vi hade kor, höns, grisar och en tjur, som vi kallade för Abil.

Abil gick alltid lös på gården, det gick inte att ha honom i hagen.

Mi pensis ke Abil estas amuza, li ĉiam iris siajn proprajn vojojn.

Mi komencis paroli kun li kaj baldaŭ li aŭskultis kaj ni fariĝis bonaj amikoj.

Mi nur fajfis al li, kaj li venis. Ni iris longajn promenojn en la arbaro, kaj li ĉiam iris post mi.

Foje ni iris al la hejmo de mia onklo, kiu loĝis kelkan kilometron for.

Mia onklo estis ekstere en la ĝardeno kaj li sciigis al mi ke miaj onkloj vizitas lin kaj ke ili estas en la kuirejo. "Ĉu ni eniru kun Abil por timigi ilin", mi diris ridetante per mia tuta vizaĝo.

"Kiel vi igu Abil en la kuirejon? Kiel li transiros la ŝtuparon?", diris mia onklo.

"Neniu problemo", mi diris kaj komencis iri.

Abil sekvis min kaj baldaŭ ni estis en la kuirejo.

Kiam miaj onkloj ekvidis la virbovon, ili kriis pro timo. Mi nur ridis kaj provis klarigi ke Abil estas ege bona.

Mi havas multajn gajajn kaj belajn memorojn de tiu tempo. / Åke Vallin

Jag tyckte Abil var rolig, han gick alltid sina egna vägar.

Jag började prata med honom och snart lyssnade han och vi blev goda vänner. Jag behövde bara vissla på honom, så kom han.

Vi gick långa promenader i skogen och han gick alltid lugnt efter mig.

En gång gick vi hem till min morbror, som bodde någon kilometer bort.

Min morbror var ute i trädgården och han berättade att mina mostrar var på besök och att de var i köket. "Ska vi gå in med Abil och skrämma dem", sa jag och log med hela ansiktet.

"Hur ska du få in Abil i köket? Hur ska han komma upp på trappan", sa min morbror.

"Inga problem", sa jag och började gå.


Abil följde efter mig och snart var vi inne i köket.

När mina mostrar fick se tjuren, skrek de av rädsla. Jag skrattade bara och försökte förklara att Abil var jättesnäll.

Jag har många glada och fina minnen från den tiden. / Åke Vallin



La korniko Jillis – Kråkan Jillis



Je la aĝo de 16 mi translokiĝis al Gotenburgo de mia infanaĝa hejmo en Dalslando. Mi estis bonŝanca trovi apartamenton en Lindholmen, Hildagatan 41.

lun tagon mi trovis kornikidon, kiu estis falinta el la nesto. Mi levis ĝin – – – kaj ĝi transvivis. Mi nomis ĝin Jillis. Ĝi estis agrabla ulo.

Ĝi rapide lernis kiel fari por igi sian volon regi. Ĝi kriis, kiam li volis eksteren. Tiam mi devis malfermi la fenestron kaj ĝi flugis eksteren.

Kiam ĝi volis interen, ĝi kriante bekfrapis sur la fenestro, kaj tiam mi devis malfermi kaj lasi ĝin interen.

Mi kaj miaj kunuloj kutimis mekanikumi kun niaj mopedoj sur la korto kaj tiam Jillis ĉiam kunestis.

Ĝi amis preni ŝraŭbingojn kaj aliajn objektojn kaj kaŝi ilin. Ĝi vere ĝojegis, kiam ni devis ĉirkaŭkuri serĉante. Tiam ĝi sidis distance grakante. Ĝi sciis ke ni koleriĝis kontraŭ ĝi.

lun tagon estis ŝtormo, sed tamen Jillis volis eksteren. Mi lasis ĝin eksteren kaj ĝi flugis en la vento tien – reen.

Vid 16 års ålder flyttade jag till Göteborg från barndomshemmet i Dalsland.

Jag hade turen att hitta en lägenhet på Lindholmen, Hildagatan 41.

En dag hittade jag en kråkunge, som hade fallit ur boet. Jag lyfte upp den – – – och den överlevde. Jag döpte den till Jillis. Han var en rolig prick.

Han lärde sig snabbt hur han skulle göra för att få sin vilja igenom. Han skrek, när han ville ut. Då fick jag öppna fönstret och han flög ut. När han ville in, pickade han på fönstret och skrek, och då var det bara att öppna och släppa in honom.

Jag och mina kompisar brukade meka med våra mopeder på gården och då var Jillis alltid med.

Han älskade att ta muttrar m.m. och gömma dem. Han hade så roligt när vi fick springa runt och leta. Då satt han på avstånd och kraxade. Han visste, att vi var arga på honom.,

En dag var det storm ute, men Jillis ville ut ändå. Jag släppte ut honom och han flög i vinden fram och tillbaka.

Kiam ĝi volis interen, la vento kaptis ĝin kaj ĝi flugis en la fenestron kaj rompis sian nukon.

Estis granda malĝojo inter ni. Ni faris keston kaj metis Jillis en ĝin.

Ni planis la enterigon al la sekva dimanĉo je la 12a h sur la futbala ludkampon.

Granda anonco estis enmetita en la lokan gazeton. Tuj antaŭ la 12a ni marŝis kun la kesto en la futbalan ludkampon.

Estis multe da homoj tie, ĉar ĉiuj estis scivolemaj. Ni fosis tertruon, metis la keston tien kaj verŝis teron sur ĝin.

Ni kantis kanton kaj trinkis enterigan bieron kaj diris adiaŭon al Jillis.

Mi havas multajn bonajn memorojn de la korniko Jillis.

/ Åke Vallin

När han ville in, tog vinden tag i honom och han flög in i fönstret och bröt nacken.

Det blev stor sorg bland oss alla. Vi gjorde en kista och la Jillis i den.

Vi planerade begravningen till påföljande söndag kl. 12 på fotbollsplan.

En stor annons sattes in i lokaltidningen.

Strax före 12 tågade vi in med kistan till fotbollsplanen.

Det var mycket folk där, för alla var ju nyfikna. Vi grävde en grop, lade ner kistan och öste jord över den.

Vi sjöng en sång och drack gravöl och sa adjö till Jillis.

Jag har många fina minnen av kråkan Jillis.

/ Åke Vallin



Nizostrigo – hökuggla – Jan Hellström raportas

La nizostrigo kovas la idojn en Norrlando, sed aperas kiel pasbirdo kelkajn jarojn aŭtune kaj vintre en suda Svedio. Parte ĝi aktivatas tage kaj vivtenas sin de etaj ronĝuloj kaj birdoj.

Ĉi tiun vintron Änggårdsbergen en Gotenburgo havis viziton de nizostrigo. Tio logis multajn birdobservantojn kaj fotistojn. /Jan

Fotis: Jan Hellström.

**Kavat estas
31jara ĉevalo
pri kiu Marie-
Louise Börjesson,
Lerum, rakontas**



**Kavat är en
31-årig häst,
som Marie-Louise
Börjesson, Lerum,
berättar om**

En ĉi tiu tempo de kvaranteno estas mirinde por mi havi eblecon zorgi pri la ĉevalo de mia filino.

La stalo troviĝas en Lerum survoje al Gråbo, ĝia fako estas ekstera fako, t.e. ĝi havas la kapon ekstere, ricevas freŝan aeron kaj superrigardas ĉion, kio okazas kaj havas lokon sur la korto.

Frumatene mi estas sola. Estas mirinde veni en la arbaron kaj sperti la verdan brilon de la musko, rajdante malrapide.

Kiam ni povas trovi novajn vojojn aŭ padojn, ĝi povas ekpepi kaj fari eksalton pro ĝojo.

Ĝi ankaŭ estas la sekura, kuraĝa heroo, kiam la aliaj ĉevaloj ne kuraĝas antaŭeniri. Tiele ili sekvas Kavát tra riveroj kaj deklivoj.

La ĉevalo nomiĝas Kavát kaj havas 31 jarojn, vigla kaj atentega.

Mi mem estas en la "kvarantena aĝo" kaj rajdis ekde mi estis sep-jara. Kavát naskiĝis en bieno en Smolando, kie mi loĝis 30 jarojn pli frue. La nomo (kavat = memfida) ekzakte taŭgas. Same elegante kaj move li povas fari siajn ĝojsaltojn. Estas decidiĝinta sinjoro, sed ĉiam ĝi faras sian plej bonan.

Ni transportis ĝin al mia filino, kiam ĝi havis kvar jarojn al ĝia unua loĝejo en Lindome.

I dessa karantäntider är det underbart att få sköta om min dotters häst. Stallet är i Lerum på väg till Gråbo, hans box är en utebox, d.v.s. han har huvudet utanför, får frisk luft och överblickar allt som händer och sker på gården.

Tidigt på morgonen är jag ensam.

Det är så fantastiskt att få komma ut i skogen och uppleva det gröna ljuset från skogens mossor i sakta mak.

Då vi tar oss in på nya vägar eller stigar, kan han pipa till och göra ett skutt av glädje.

Han är även den säkre, modiga hjälten när de andra hästarna inte vågar gå framåt. Då följer dom Kavát genom bäckar och branter.

Hästen heter Kavát och är 31 år pigg och alert.

Själv är jag i "karantäns" ålder och har ridit sen jag var 7 år. Kavát föddes på en gård i Småland, där jag bott i 30 år tidigare. Namnet passar precis. Lika elegant och rörligt kan han göra sina glädjesprång. Det är en bestämd herre men gör alltid sitt bästa.

Vi körde ner honom till min dotter när han var 4 år till hans första bostad i Lindome.

Sen har det varit många olika stall.

Dottern har åkt kommunalt och cyklat i ur och skur i alla år för att sköta Kavát. Beundransvärt.

Poste estis multaj diversaj staloj. La filino iris per publikaj veturiloj kaj biciklis en ĉia vetero dum ĉiuj jaroj por zorgi pri Kavato.

Admirinde!

Dum tri jaroj la filino loĝis kun sia familio en Skotlando. Kavato tiam estis ludonita al rajdinstruisto, por konkursigi ĝin en la pli granda dresado.

Unu tagon en la nova loko, kie li komence staris en propra ĉirkaŭfermita paŝtejo, ĝi pensis ke estas tempo eniri la stalon – aŭ ĉu ili tiam forgesis ĝin? Kavato bele transsaltis la barilon, eniris la stalon kaj stariĝis ekster sia fako. Eble ĝi fariĝus saltĉevalo?!

La familio decidis ankaŭ transpreni Kavato al Skotlando, la hundo ja kunestis kun propra pasporto.

La vojaĝo tien iris glate kaj Kavato sentis sin bone en Skotlando, kie ĉevaloj ĉirkaŭiras tagnokte (kun kovrilo vintre). Notu ke estis la plej malmultekosta maniero malaktivigi ĉevalojn en Skotlando. En Skotlando estas bluve kaj pluve.

Estis bonaj vizitoj ĉe genepoj, bonaj rajdekursoj en la skota pejzaĝo. Kavato retenis sian salttalenton kaj kiam la herbo estis pli bone en la kontraŭa flanko ĝi "velis" super la bariloj facile kaj flekseble.

Tio fariĝis problemo, kaj oni trovis stalon kun grandaj teritorioj, por ke ĝi povu kontentigi siajn genojn el la stepo – vagi kaj manĝi.

En la nova loko estis kvin eksteraj fakoj, el kiuj unu fariĝis tiu de Kavato. Pluvas en Skotlando, la selejo fariĝis plena de akvo kaj nun ĝi devis loĝi kune kun sia propra ekipaĵo.

Kavato neniam tuŝis ion. La familio poste translokiĝos hejmen kun hundo kaj ĉevalo.

Oni bezonis 10 tagojn por hejmeniri kun diversaj transŝarĝadoj per diversgrandaj ĉevaltransportaj entreprenoj.

Ĝi estis iomete elĉerpita, kiam ĝi hejmeniris al Kicki kaj Mats en Gullringsbo, kie ĝi staris antaŭ ol ĝi forveturis. Ili bone zorgis pri ĝi je la reveno hejmen. La filino kun sia familio alvenis kelkajn tagojn pli malfrue.

I tre ĵar bode dottern med familj i Skottland. Kavato var då uthyrd till en ridlärare, för att tävla honom i den högre dressyren.

En dag på det nya stallet, där han i början stod i en egen hage, tyckte han att det var på tiden han skulle in i stallet – eller om de då hade glömt honom. Kavato hoppade snyggt över staketet gick in i stallet och ställde sig utanför sin box. Han kanske skulle blivit hopphäst?!

Familjen bestämde att även ta över Kavato till Skottland, hunden var ju med, med eget pass.

Resan dit gick bra och Kavato trivdes i Skottland där hästar går ute dygnet runt (med täcke på sig vintertid) Notera: att det var det billigaste sättet att inaktivera hästar i Skottland. I Skottland är det blåsig och regnigt.

Det blev fina besök hos barnbarn, fina ridturer i det skottska landskapet. Kavato hade kvar sin hopptalang, för när gräset var bättre på andra sidan seglade han över staketen lätt och smidigt.

Detta blev ett problem så det letades upp ett stall med stora marker, så han kunde tillgodose sina gener från stäppen att vandra och äta.

På det nya stället fanns 5 uteboxar, varav en blev Kavatos. Det regnar i Skottland, sadelkammaren blev full av vatten och nu fick han kampera ihop med sin egen utrustning.

Kavato rörde aldrig någonting. Familjen skulle sedan flytta hem med hund och häst. Det tog Kavato 10 dagar att komma hem med olika omlastningar, med två olika stora hästtransportbolag.

Han var lite medtagen när han kom hem till Kicki och Mats på Gullringsbo, där han stått innan han reste. De tog väl hand om honom vid hemkomsten. Dottern med familjen kom ett par dagar efter.

På vackra Gullringsbo stod Kavato i sammanlagt 22 år. Vi har haft tur, han har varit frisk och kry.

En bela Gullringsbo Kavát restis entute en 22 jaroj. Ni estis bonŝancaj, ĝi estis sana kaj vigla.

Mia filino iomete konkursis pri dresado, saltado kaj kampkonkurso kune kun ĝi.

Nuntempe ŝi foje trejnas Rajdantan arkopafadon, tion Kavát trovas amuza.

La filino galopas plenrapide sen uzo de bridoj kaj havas pafarkon en la mano pafante al pendigita tabulo.

Troviĝas kronviruso, de kiu ankaŭ ĉevaloj povas esti kontaĝitaj, sed ĝi ne kontaĝas homojn.

Ni vidu kiel evoluas nia kvaranteno. Sed estas mirinde ke ĉiuj povas restadi ekstere en la arbaro.

/ Marie-Louise Börjesson

Min dotter har tävlat lite i dressyr, hoppning och fälttävlan med honom.

I dagsläget tränar hon ibland. Beridet bågskytte, det tycker Kavát är kul.

Dottern galopperar i full fart med lösa tyglar och har pilbåge i handen och skjuter mot en uppsatt måltavla.

Det finns ett coronavirus som även hästar kan bli smittade av, men det smittar inte till människor Vi får se hur det utvecklar sig med våran karantän. Men det är underbart att alla kan vistas ute i skogen.

/ Marie-Louise Börjesson



Azenoj en Nepalo



”Stulta kiel azeno” kaj ”obstina kiel azeno” estas du ordinaraj esprimoj. La unua, ke azenoj estus stultaj ĉar ili ne ĉiam faras tion, kion ni deziras, mi volas kontraŭdiri. La dua, pri obstino, foje estas necesa kvalito.

Mi antaŭlonge iris laŭ karavanvojoj de centra Nepalo norden kontraŭ la Tibeta limo. Oni preteriras multe da urbetoj kaj vilaĝoj. Nenie estas iu aŭtotrafiko, estus absurde multekosta ĉar la tereno ĉie estas tre kruta.

Sed azenokaravanoj funkcias perfekte, karavano de 10–20 azenoj akompanas kun unu, nur unu, homo. Ĉe la kapo de la karavano iras gvida azeno, kiu scias kion ŝi farus je ĉiaj situacioj; vojforkoj, malvastaj pasejoj, mallargaj pontoj, trafi aliajn karavanojn kaj tiel plu. Tiam estas ŝi, kiu elektas ĝustan vojon je kruciĝejoj, taksas la eblecojn ke 1) nur pluri 2) trapati al si vojon antaŭ la kontraŭa trafiko aŭ 3) ĝisatendi ilin. La karavankondukanto (malgraŭ ĉio li estas kondukanto) iras laste kaj superrigardas la tutan akompanion.

La gvida azeno kompreneble estas ”reĝino” kaj ŝi ankaŭ estas respektata kaj vestita kiel tiu. Ŝi havas grandan, triangulan felpecon de la frunto suben sur la buŝego, ornamita kun brodaĵoj kaj juveloj, ofte kun ronda speguleto meze. Aliaj ornamoj pendas sub la kaprimeno, en kelkaj oni povas meti iomete da bona manĝaĵo. Sur la nuko ŝi havas grandan plumtufon, kiu svingiĝas kiam ŝi iras.

Foje, kiam mi pluiros post paŭzo, mi sekvis post karavano preskaŭ tutan tagon. Mi iris proksime post la karavano kaj aŭdis tiam, de antaŭtagmezo al malfrua posttagmezo, la

kondukanto ludi per eta fluto. Tiu melodio fiksiĝis en mia kapo, mi neniam forgesos ĝin. Ĝi sonis tiel:



Mi kredas ke kaj la azenoj, la kondukanto kaj mi luliĝis en senŝanĝa troto pro tiu melodio, kiun li ludis senĉese (preskaŭ). Aliaj kondukantoj kantis aŭ parolis al siaj bestoj.

La obstineco sendube venis oportune ĉar ĉiu etapo kaŭzis niveldiferencojn je centoj da

metroj, foje je kilometro, sed la azenoj strebis supren.

La trankvileco de la azenoj antaŭ la preterpaso de mallargaj, foje iom difektitaj pendpontoj kvindek metrojn super furiozaj torentoj, donis al mi kvietecon kaj fidon. Kiam estis truoj en la tabulkovrado de la


ponto, ili simple tretis sur la tabulo apud la truo. Do, mi ankaŭ faru tiel, mi pensis, sed diferece de la azenoj kaj la kondukanto, mi firme tenis min je la ŝtalŝnuroj de la pendponto.



Foje la vojo estis enĉizita en la monto, tial estis mallarĝa rokbreto por iro, kun rokmuro je unu el la flankoj kaj terura abismo je la alia. Kiam oni tiam trafas kontraŭan karavanon, oni provas iri ĉe la rokflanko, kelkfoje oni sukcesis, aliffoje ne. Mi kredas ke la azenoj kondukis maldekstre flankan trafikon. Oni ne luktus kun azeno apud krutegaĵo je centoj da



Tie ankaŭ estas ebleco por homoj manĝi kaj tranokti. Kuŝejon, kovrilon, miksofritaĵon kaj teon. Krome, oni renkontas homojn. Kamparanoj kaj karavankondukistoj ne parolas multe da lingvoj. Sed gastejestroj kaj iliaj familianoj parolas multe da lingvoj, ne la



metroj. Sed oni ja povis teni ĉiun azenon laŭ tio, kiel ili pasis.

De tempo al tempo la karavano kompreneble devas ripozi kaj manĝi. Tie troviĝas etaj placoj kie oni povas reŝarĝi varojn al aliaj karavanoj kaj portistoj kiuj iros je flankaj vojoj.



sveda, kompreneble, sed la angla funkcias bone. En la gastejo "Dhaulagiri food and lodging" mi informiĝis post la matenmanĝo per ilia 12-jaraj filo ke la sveda reĝo en la dekoka jarcento, Gustaf III, malpermesis ĉian kafotrinkadon en Svedio. Li ĵus lernis tion en

la lernejo en Tatopani (kiu signifis "gejserojn"), nealirebla vilaĝeto en Himalajo. Mi ne sciis pri tio malpermeso, sed post tiam, mi neniam forgesos tion.

Lasse Granat



Adam, 8 år, berättar om Genki, sin hund

Adam, 8-jara, rakontas pri Genki, sia hundo

Vilket slags hund är Genki?

Genki är en av Sveriges friskaste hundar. Han är en Västerbotten-spets.

Han är 92 hundår – eller 14 människoår.

Vems var hunden, innan du fick den?

Det var mormor och morfars hund, men nu är den min.

Ja, du har ju känt Genki länge. Hur är det att alltid ha honom i ert hus?

Bra! Det är skönare. Genki sover på en fårfäll i mitt rum. På dagarna väljer han ryamattan i vardagsrummet.

Kan du se om Genki är glad, ledsen eller rädd?

Jag ser aldrig att han är ledsen, men när han är glad krullar han ihop svansen. Det gör den rasen. När det var Nyår låg han under mitt pysselbord och gnällde. Han gillar inte nyårsraketer och smällare. Han är också rädd för att få klorna klippta. Vi åker till en zoo-affär och då måste han ha munkorg på sig.

Kia speco de hundo estas Genki?

Genki estas unu el la plej sanaj hundoj de Svedio. Ĝi estas Okcidenta Botnio-ŝpico.

Ĝi havas 92 hundjarojn – aŭ 14 homjarojn.

Kies estis la hundo, antaŭ ol vi ricevis ĝin?

Estis la hundo de miaj geavoj, sed nun ĝi estas la mia.

Jes, vi ja konas Genkon longtempe. Kiel estas ĉiam havi ĝin en via domo?

Bone! Estas pli agrable. Genki dormas sur ŝafofelo en mia ĉambro. Tage ĝi elektas la vilteksan tapiŝon en la ĉiutaga ĉambro.

Ĉu vi povas vidi ĉu Genki ĝojas, malĝojas aŭ timas?

Mi neniam vidas ke ĝi estus malĝoja, sed kiam ĝi ĝojas ĝi krispigas la voston. Tion faras tiu raso. Kiam estis Novjaro, ĝi kuŝis sub mia laboreta tablo, ĝemante. Ĝi ne ŝatas novjarajn raketojn kaj knalpizojn.

När han lyssnar, vinklar han upp öronen. Om vi säger att vi ska gå ut, kommer han rusande mot kopplet. Han kan vara både lugn och vild.

Vill Genki hälsa på andra hundar, när ni är ute och går?

Jaa, han är galen i flickhundar. Han har en flickvän, en hund som bor ganska nära oss. Men Genki kan vara rädd för människor.

Varför det?

Vet inte. Egentligen är han en jakthund, men han är väldigt snäll.

Har Genki någon favoritmat?

Jaa, han gillar att äta upp mina korvresten. Korv Stroganof gillar han också.

Jag har hört att mamma och Genki följer dig till skolbussen. Du går i skolan som vanligt trots corona-viruset. Är det något som har blivit annorlunda sedan viruset kom.

Ja, vi tvättar händerna jätteofta och nu får fröknarna lägga upp maten på våra tallrikar. Förr kunde vi själva ta.

När fyller Genki år?

Jag ska fråga pappa... Jo, om 10 dagar. Genki ska få en tårta, men ingen vanlig tårta. Jag ska göra en med korv i botten och sedan hundgodis och sist ett lager med korv igen.

Och du själv, vad ska du äta då?

Jag gillar hamburgare från Max och sedan gammeldags vaniljglass

Då får jag önska er en riktigt trevlig Genki-födelsedag!

/Siv

Ĝi ankaŭ timas havi siajn ungojn tonditaj. Ni iras al zoo-vendejo kaj tiam ĝi devas porti muzelingon.

Kiam ĝi aŭskultas, ĝi direktas la orelojn supren. Se ni diras ke ni iru eksteren, ĝi venas kurante kontraŭ la hundorimeno. Ĝi povas esti kaj trankvila kaj sovaĝa.

Ĉu Genki volas saluti aliajn hundojn, kiam vi iras ekstere?

Jes, ja, ĝi freneziĝas pri knabinhundoj. Ĝi havas koramikinon, hundinon, kiu loĝas sufiĉe proksime al ni. Sed Genki povas timi homojn.

Kial?

Mi ne scias. Fakte ĝi estas ĉashundo, sed ĝi estas tre bonvola.

Ĉu Genki havas preferatan nutraĵon?

Jes, ĝi ŝatas formanĝi miajn kolbas-restaĵojn. La manĝaĵon Kolbaso Stroganova ĝi ankaŭ ŝatas.

Mi aŭdis ke patrino kaj Genki akompanas vin al la "lernejbuso". Vi frekventas la lernejon kiel kutime, malgraŭ la kronviruso. Ĉu estas io ŝanĝita post ke la viruso alvenis?

Jes, ni lavas la manojn treege ofte kaj nun la instruistinoj metas la manĝaĵon sur niajn telerojn. Antaŭe ni mem povis preni.

Kiam Genki havas naskiĝtagon?

Mi demandos al paĉjo... Jes, post 10 tagoj. Genki ricevos torton, sed ne ordinara torto. Mi faros torton kun kolbazo en la fundo, poste hundo-bombonoj kaj laste tavolo de kolbazo denove.

Kaj vi mem, kion vi manĝos?

Mi ŝatas hamburgorojn de Max kaj poste malnovtempa vanilan glaciaĵon.

Do, mi deziras al vi veran agrablan Genki-naskiĝtagon!

/Siv



Alicia, trovita kato

venis al ni en Gråbo la 28an de novembro en 2008. Mortis la 1an de aprilo en 2019. Tiam ĝi povus esti 17-jara Persa kato en kombino kun brita mallonghara kato.

Ni certe ne havis ideon aĉeti katon, sed hazarde ni ekhavis mirindan nigran katon, Alicia. Dum tri monatoj homoj en Landvetter vidis maldikan katon, kiu serĉis nutraĵon.

Ŝi timis homojn kaj preferis kaŝi sin en arbaro.


Ĝi verŝajne estis al kutimigita manĝi nur industri-faritan nutraĵon kaj ne kapablis kapti bestetojn.

Malsato igis ĝin en la proksimecon de homoj kaj iu bonulo sukcesis kapti ĝin, meti ĝin en kaĝon kaj lasi ĝin en kathotelon. La katino portis kolbendon kun metala guto, sed sen nomo kaj adreso de la posedanto. Oni nomis ĝin Alice.

Post kelkaj semajnoj la pezo de Alicia estis bona kaj oni vendis ĝin interrete. Kursano de mi aĉetis ĝin, sed post nur kelkaj semajnoj ŝi malsaniĝis kaj petis min zorgi pri la kato.

Kiam la taksio venis por veturigi ŝin al hospitalo mia edzo kaj mi staris en ŝia domo kun ŝlosilo, kaĝo, katsablo, katnutraĵo – kaj gantoj. Alice certe ungratos vin, mia kursano diris.

Do, ni estis pretaj kapti la katon. Ni serĉis, sed ne trovis ĝin nek en la baza etaĝo, nek en la unua. – Alice certe kuris eksteren kiam la



taksi-ŝoforo malfermis la pordon, mia edzo diris. Ni serĉis en la ĝardeno, ni serĉis en la ĉirkaŭaĵo kun katbombono en la manoj. Estis nokto, la stratlampoj lumigis parton de la ĉirkaŭaĵo.

Jes, fakte estis nigra kato sur pado, kato, kiu ŝajne ne timis nin. Sed ĉu ĝi estas Alice? Jes!

Ne! Jes! Ne! Ĉu Alice havas blankajn piedojn? Ne, eble ne.

Ni revenis al la domo, malfermis la pordon, kaj alte sur la ŝtuparo inter la etaĝoj staris

Alice kun mieno dirante: – Mi ja estis ĉi tie la tutan tempon.

Do, Alice translokiĝis de Lerum al Grábo. Ni ŝanĝis la nomon al Alicia kaj ĉesis diri **ĝi**, ĉar estas ja **ŝi** – nova membro de la familio.

Ĉiuj ŝatis Alician, sed ŝi ne ŝatis ĉiujn. Precipe infanojn ŝi ne ŝatis. Kiam venis infano, ŝi kaŝis sin.

Ŝi ankaŭ kaŝis sin kiam estis tempo iri al la zoo-vendejo, kie virino tondos ŝiajn ungojn.

Eĉ se ŝi ne vidis la kaĝon ŝi iel sentis miajn pensojn. Okazis ke mi iris al la zoo-vendejo sen kato demandante pri nova tempomendo.

Hejmenirinte mi tamen renkontis ŝin atendante en la vestiblo kiel kutime.

Tempo pasis. Ŝi fariĝis pli kuraĝa kaj ofte atentigis nin, kiam venis homoj. Se venis gasto kun hundo, ŝi sidiĝis en alta loko spektante la hundon.



Amuze flari la odoron de floroj! Sed kiam ŝi intencis flari erinacon sur nia herbejo, la erinaco siblis, kaj Alicia rapide kuris en la altanon.

Ĉiun vesperon ŝi miaŭis "Bonan nokton!" kaj kuŝis kelke da tempo en mia lito. Ĉiun



Alicia ne ŝatis esti Kristnaska kato.

matenon ŝi miaŭis: "Estas tempo por matenmanĝo!"

Alicia maljuniĝis. Ŝi ne facile plu povis salti.

Sekvis vizitoj al veterinaro. Ŝia artrozo malhelpis ŝin sidi en siaj altaj preferataj lokoj. Eĉ iri en la ŝtuparo fariĝis iomete malfacile, kaj ŝi verŝajne malĝojis. Post rentgeno mi kune kun la veterinaro decidis ke estas tempo por ŝi eniri la katparadizon.

La 1an de aprilo en 2019 mi faris la lastan foton de Alicia kaj iris al la veterinaro. Oni eklumigis kandelon, donis al ŝi trankviligan injekton antaŭ la mortigan.

Ankoraŭ mi reagis kiam estas iu nigra kiu moviĝas.

Ankoraŭ mi tre zorgeme malfermas pordon... povus ja sidi nigra kato malantaŭe.

Domo sen kato ne estas la sama domo.

Alicia mankas al mi.

/Siv

Printempaj hajkoj

Mi turnis min –
sed la viro kiun mi renkontis
jam estis unu kun la nebulo

Shiki

Subite mi ekpensis
ke mi rastu la korton
en la printempa vespero

Tairo


Lenke Szász: El eseo de György Bálint (1906–1943)

Jen fragmento el eseo de György Bálint, tradukita de mi. /Lenke

El la tagĵurnalo de la kato

(Fragmento)

Ne estas vere, ke mi ne amas la hejmanojn. Ankaŭ mi kapablas ami, same kiel ĉiu vivulo, sed ne senkritike. Mi amas nur tiun, kiu estas aminda. Miajn sentojn mi ne esprimas laŭte, spektakle. Kiu ne komprenas mian mallaŭtan ronronadon, tiu ne meritas la amikecon de inteligentaj, bongustaj bestoj. Kiu ne kapablas longe sidadi samloke, tiu ne meritas mian societon. Kiu ĉiam bezonas nur bravan spektaklon, por kiu ne sufiĉas la simpla beleco de la naturaj movoj, tiu neniam povos akiri la simpation de kato. Kiu ĉiam postulas novaĵon, kiu ĉiam peladas la variecon, la eksciton, kiu ne ŝatas la pacon, la ekvilibron, la konstantecon, kiu kredas, ke li ĉiam devas pruvi sian ekzistorajton, ki ne konas la belecon de la meditado, tiu neniam havos




fidelan katon. Kiu pelas la supraĵajn plezurojn de la vivo, al tiu la kato turnas la dorson. Kiun la katoj ŝatas, tiu ne povas esti fihomo.

Elhungarigis:

Lenke Szász

Iksodo – eta sed danĝera besteto



Iksodo (*Ixodes*) vivas sur herbo kaj arbetoj, sed suĉas sangon de mamuloj.

Ĝi transigas mikrobojn kiuj kaŭzas malsanon de Lyme (*Borrelia*) kaj makulan febron (*Rickettsia rickettsii*).

Ĝi forte multiĝas, se la vintro estas milda kaj la somero varmeta, pluva.

La piko de iksodo ne estas rimarkebla, ĉar iksodo anestezas la haŭton de viktimo antaŭ la piko. Ĝi suĉas la sangon nur dum la unuaj kelkaj horoj, tiam oni povas ankoraŭ eltiri ĝin,



tiam ĝi ankoraŭ ne infektas la homon. Sed post 4–6 horoj, ĝi infektas la homajn histojn. Laŭ ĝeneralaj spertoj, nur ĉiu 1000-a iksodo estas infektokapabla per meningita viruso kaj nur ĉiu 10-a per bakterio de la Lyme-malsano. La infekton montras ruĝiĝo ĉirkaŭ la pikloko.

Oni povas vakcini kontraŭ meningita infekto (la 2-a vakcino sekvas la unuan post 1–3 monatoj kaj la 3-a vakcino sekvas la duan post unu jaro). Tio protektas la homon kontraŭ infekto de meningito dum 3 jaroj.

Kontraŭ la malsano de Lyme (borelioza) ne ekzistas preventa vakcino.

Malsano de Lyme estas malfacile rekonebla malsano, kun jenaj simptomoj:


- laciĝemo
- malrapidiĝemo
- artikaj kaj muskolaj doloroj
- perturboj de la nerva sistemo, memoro
- ŝveliĝo de limfaj nodoj

Oni devas eviti herbaron kaj arbarojn iksodoriĉajn, sed enirinte tian lokon oni devas bone sin vesti (longa pantalono, ŝtrumpeto, blanka ĉapelo). La iksodoj kutimas atendi siajn viktimojn troviĝante fine de herbo; tial plej bone oni evitu kuŝi inter herboj.

(El Interreto de Siv)

Kokcino

Kokcino (esperante)
Nyckelpiga (svede)
Ladybird, Ladybug (angle)
Marienkäfer (germane),
Leppäkerttu (finne)
Coccinelle (france)
Mariehøne (dane)
Mariehøne (norvege)



Jen poemo pri kokcino de Julio Baghy el "La vagabondo kantas"

KOKCINO, kokcino,
skarabeto de l' ĉielo,
onidir' pri vi raportas,
amajn pensojn vi disportas.
Flustru al mi kies amo
sendis vin al mia mano?
Ĉar poeton centoj amas,
lia kor' por centoj flamas.

Kokcino, kokcino,
skarabeto de l' ĉielo,
ho, refugu, al ŝi diru,
al poet' ŝi ne sopiru,

ĉar li estas vagabonda,
por li nigra, bruna, blonda
nur momente estas gemo,
poste iĝas nur – verstemo.

Kokcino, kokcino,
skarabeto de l' ĉielo,
mi mensogis (nun mi sentas),
mia koro kison sendas,
dankan kison pro memoro,
larman kison al la foro...
Kiu ajn vin sendis al mi,
Dio donu benon al ŝi.

HEJ KOKCINO!

Hej Kokcino,
flugu al ĉielo!
Tie viaj idoj



ĉe tablo sidas
manĝas bombonojn
sed al vi ne donas.

Kokcinelo – magia insekto

Kokcinelo reprezentas la feliĉon, kaj aparte la patrinan feliĉon de la Virgulino Maria. Laŭ malnova superstiĉo kokcinelo povas antaŭdiri la estontecon. Ekz. se kokcinelo sidas sur via mano kaj rampas inter viaj fingroj, ĝi mezuras

vian manon por novaj gantoj – aŭ por geedziĝo aŭ por enteriĝo. Kiun el ili oni ne scias...

”Kokcinelo, kokcinelo, flugu, flugu... kaj donu belan veteron, kaj vi havos novajn vestojn.”

/Siv

”Granatbabilaĵoj”

”Bamse” estas unu el miaj veraj favoratoj. Rune Andréasson ricevis ludil-urson kiel 1:an naskiĝdonacon kaj tiu urso inspiris lin krei la desegnan bildstrion pri ”Bamse”.

Rune Andréasson mortis en la jaro 1999 sed la urso ”Bamse” kun amikoj vivas ankoraŭ kaj estas bona moral-erudicio por infanoj en ĉiuj aĝoj.



Bamse kaj liaj amikoj

Bamse estas unu el miaj veraj favoratoj. Bamse estas ĉiam bona kaj saĝa. Forta li fariĝas per la speciala mielo kiun lia avino faras. Tiam estas plej bona havi puran farunon en la sako.

Do, la Lupo malofte havas puran farunon en sia sako kaj li ofte kaptiĝas en grandaj hontegoj fojon post fojo, kaj kiam estas veraj rulfaloj la urso Bamse ĉiam staras apude kaj diras ion ĉagrenan kaj saĝaĉan, pensas la Lupo.

Troviĝas du pliaj uloj kiuj ne volas renkonti Bamse kiam li estas plena de ”avinmielo” kaj ili estas ”Knocke” kaj ”Smocke” (Bate kaj Frape). Ili estas la plej malsaĝaj subuloj de ”Krösus Sork” (Krezo Arvikolo).

Bamse ridas ankoraŭ kiam li pensas pri la fojo kiam la du ”gemoj” perfortis lian pordon spite ke la pordo ne estis ŝlosita...

Bamse och hans vänner

Bamse, han är en av mina verkliga favoriter. Han är alltid snäll och förståndig. Stark blir han om han äter av farmors goda honung och då är det bäst att man aktar sig om man inte har rent mjöl i påsen.

Vargen har ju sällan rent mjöl i påsen och han åker på den ena nesan efter den andra och när det blir en riktig kullerbytta står ofta björnen Bamse bredvid och är sådär riktigt praktig och säger något försmädligt klokt, tycker Vargen.

Det finns två gynnare till som inte gärna vill träffa Bamse när han är laddad med ”Dunderhonung” och det är Knocke och Smocke. Krösus Sorks minst sagt korkade underhuggare. Allt går på tok när de är i farten.

En la jaro 1932, li tamen ripozis sin sur teraso ĉe la restoracio de Henriksberg. Do, li eble ne ripozis, sed verkis nome sian debutromanon "Bombi Bitt kaj mi", tiam kaj tie.



La literatura societo de "Piraten" metis memorŝildon sur la fasado de Henriksberg, kiu rakontas pri la literatura okazo en la centro de Gotenburgo.

Mem "Piraten" skribis:

Estis mirinda majo tiun jaron. Mi sidis sur la teraso ĉiujn tagojn de uno kaj duono ĝis la kvara. Estis sen homoj tiam. Estis agrablegaj tagoj.

La suno brilis kaj ĵusnaskita verdo malfermiĝis, la rivero brilis. La bruego de la haveno estis simfonio kaj la arboj kreskis rekte el la ligna planko de la teraso. Estis facile skribi.

Tiel, dum kelkaj printempaj kaj someraj semajnoj li skribis la plejparton de sia debuta romano "Bombi Bitt kaj mi" sur la Henriksberga teraso. Se li iam mendis la paradan pladon "Soleo Walewska" mi ne scias, sed jen la recepto:

Soleo Walewska

Porcioj por 2–3 personoj

1. 600–700 gramoj da soleo, senhaŭtigita
2. 1 boligita omaro, ĉirkaŭ 500 g
3. 1 malgrande dishakita ŝaloto
4. 2 dl da seka, blanka vino
5. Fandita butero
6. Freŝa vintra trufo
7. Salo

År 1932 vilade han sig däremot på Restaurang Henriksbergs terrass. Ja, vilade sig kanske han inte gjorde, han skrev nämligen sin debutroman, "Bombi Bitt och jag", där och då.

Det litterära sällskapet för "Piraten" har satt upp en skylt på fasaden som vittnar om denna stora litterära händelse mitt i Göteborg.

Själv skriver "Piraten":

Det var en underbar maj det året. Jag satt ute på terrassen varje dag mellan halv två och fyra. Det var alldeles folktomt då. Det var ljuvliga dagar.

Solen lyste, späd grönska sprang ut, älven glittrade, larmet från hamnen var en symfoni och träden växte rakt upp från terrassens trögolv. Det gick lätt att skriva.

Så, under några vår- och sommarveckor skrev han större delen av sin debutbok "Bombi Bitt och jag" på Henriksbergs terrass. Om han någon gång beställde restaurangens paradržätt "Sjötunga Walewska" vet jag inte men här kommer receptet:



"Sjötunga Walewska"

Portioner för 2–3 personer.

1. 600–700 g. sjötunga, flådd
2. 1 kokt hummer, ca. 500 g
3. 1 finhackad schalottenlök
4. 2 dl torrt vitt vin
5. Skirat smör
6. Färsk vintertryffel
7. Salt

Pommes duchesse

1. 300 g da "migdala terpomo"
2. 2 kulerplenoj da butero
3. 1 ovoflavo
4. 1 kulerpleno da raspita Gruyère-fromaĝo
5. Salo
6. Ŝprucaĵkonuso

Mornaysaŭco

1. 3 kuleretoj da butero
2. 3 kuleretoj da faruno
3. 1 dl da fiŝ-brogaĵo
4. ½ dl da norma lakto
5. 1½ dl da batita kremo
6. 2 kulerplenoj da gruyère-fromaĝo
7. Salo kaj muskato

Faru tiele:

Senŝeligu kaj kuiru la terpomojn en saleta akvo.

Pasigu la terpomojn tra pasilo aŭ terpompresilo.

Miksu buteron, ovoflavon kaj fromaĝon.

Gustumu kun salo. Verŝu la terpoman kaĉon en ŝprucaĵkonuson kun pintingo kaj konservu je endoma temperaturo ĝis estos tempo surŝpruci en servoplado.

Metu la fornon je 120 gradoj.

Lavu la fiŝon kaj fortondu la suban flankon.

Metu la fiŝon en fornorezistan muldilon.

Salu ambaŭ flankojn kaj aldonu ŝaloton kaj vinon. Kuiru meze en la forno dum 10–12 minutoj. Metu el la forno, filtru la kuirakvon kaj konservu ĝin. Dividu la fiŝon en kvar fileojn.

Metu la fileojn sub platan foliaĵon ĝis estos tempo por surtabligo.

Senŝeligu la omaron kaj dividu la voston duone.

Kunfandu la buteron en kaserolo. Kirilu la farunon kaj aldonu la kuirakvon, lakton kaj kremon dum daŭra kirlado.

Lasu la saŭcon boleti dum kirlado dum ĉirkaŭ 10 minutoj. Malaltigu la temperaturon kaj aldonu la fromaĝon. Gustumu per salo kaj

Pommes duchesse

1. 300 g mandelpotatis
2. 2 msk smör
3. 1 äggula
4. 1 msk riven Gruyèreost
5. Salt
6. Sprintsåse

Mornaysås

1. 3 tsk smör
2. 3 tsk vetemjöl
3. 1 dl fiskspad.
4. ½ dl standardmjölk
5. 1 ½ dl vispgrädde
6. 2 msk Gruyèreost
7. Salt och muskot

Gör så här:

Skala och koka potatisen i lätt saltat vatten.

Passera potatisen genom passör eller potatispress. Blanda i smör, äggula och ost.

Smaka av med salt. Häll potatismoset i en spritsåse med tyll och förvara i rumstemperatur tills det är dags att spritsa på serveringsfatet.

Sätt ugnen på 120 grader.

Skölj fisken och klipp bort slagsidan.

Lägg fisken i en ugnssäker form.

Salta båda sidorna och tillsätt lök och vin.

Tillaga mitt i ugnen i 10–12 minuter. Ta ut ur ugnen, sila och spara spadet, filea fiskens fyra filéer.

Låt filéerna ligga under plastfolie tills det är dags för servering.

Skala hummern och dela stjärten på hälften.

Smält smöret i en kastrull. Vispa ner mjölet och tillsätt spadet, mjölk och grädde under fortsatt omrörning.

Låt såsen sjuda under omrörning i cirka 10 minuter. Sänk temperaturen och tillsätt osten.

Smaka av med salt och muskot. Sätt ugnen på 275 grader grill.

muskato! Metu la fornon je 275 gradoj por kradrosto.

Metu la fiŝfileojn duope en fornorezistan pladon. Ŝprucu orname la terpomkaĉon ĉirkaŭ la fiŝo kaj peniku per fandita butero.

Metu en la fornon dum ĉirkaŭ 2 minutoj ĝis la terpomo ricevos belan koloron.

Elmetu kaj verŝu iomete de la saŭco sur la fiŝon, surtabligu la reston de la saŭco flanken.

Finu per kelkaj tranĉoj da trufo kaj eventuale per kelkaj folioj de fritita petroselo.

Memoru ke receptoj ĉiam estas rekomendo por sukcesa rezulto, sed ĉiam estas la individua gusto kaj sperto kiu decidas...

/ Ingegerd

Lägg ihop filéerna av fisken på ett ugnssäkert fat.

Spritsa potatisen runtomkring fisken och pensla med skirat smör.

Sätt in i ugnen i cirka 2 minuter tills potatisen fått en fin färg.

Ta ut och slå lite av såsen över fisken, servera resten av såsen vid sidan av.

Avsluta med några skivor tryffel och eventuellt några blad av friterad persilja.

Kom ihåg: ett recept är alltid en rekommendation för ett lyckat resultat men det är alltid den personliga smaken och erfarenheten som avgör...

/ Ingegerd



Paskaj salutoj de Lucina kaj Marek al ĉiuj konatoj en Gotenburgo!

Antaŭe ankaŭ Paulina kaj Janek salutis nin. Kaj ĵus venis letero de Elwira.

En 1918 dum "Esperanto sur la strando" en Pollando, mi sidis sur la balkono de Lucina kaj Marek kaj spertis la trafikon malsupre, sed nun la strato estas pli silenta, Lucina skribas. La kontakto kun la fratino Elwira ŝi nun nur povas havi telefone.

Pli frue ankaŭ Paulina skribis pri la restriktioj pro la covid-19-viruso kaj ankaŭ ŝi kaj Janek sendas salutojn al ni.

La mondo ŝanĝiĝis. /Siv

El letero de Elwira Twardowska:

... krom epidemio ĉe ni regas politiko. En majo devus esti elektado de la prezidento de Pollando.

... Ni havas malpermeson foriri ekster la domo do estas bona tempo por legado kaj balkona kafumado.


De mia balkono kutime eblas vidi alvenantajn kaj forflugantajn aviadilojn de la gdanska flughaveno.

...Nun flugadas nur hirundoj, mevoj paseroj kaj aliaj birdetoj.

Pasintjare estis en Gdanska Muzeo granda ekspozicio okaze de 300j datreveno de granda pesto epidemio en Gdansko. Dum ĝi mortis preskaŭ 20 miloj da homoj. Tio signifas, ke tiam mortis triono de la loĝantoj. La kuracistoj tiutempe havis por protekti sin ledajn vestaĵojn kaj la vizaĝoj estis protektitaj de specialaj maskoj kun bekoj. En bekon oni povis enmeti herbaĵojn por protekti kuraciston kontraŭ abomena odoro. Verdire nunaj personaj protektvestoj aspektas iom simile, nur la materialoj de kiuj estas faritaj ne estas same bonkvalitaj. /Elwira



Bildoj de la apartamento de Lucina kaj Marek. Ĉiam belaj floroj!



El Samarkando venis jena pasksaluto:

Karaj geamikoj,

Pasko 2020 alportu al vi kaj al viaj proksimuloj sanon, bonfarton, harmonion, amon, feliĉon, esperon, multe da pozitivo kaj vivooptimismo dum la maltrankvila periodo, kiun nun trapasas la homaro.

Belajn kaj sekurajn festotagojn al vi deziras
Anatolij & familio



Ora Ĵurnalo bedaŭrinde ankoraŭ ne iniciatis la tradicion sendi pasksalutojn al niaj kunlaborantoj kaj legantoj. Sed ni treege

taksas la salutojn de aliaj. Oni ne ĉiam povas kulpigi la covid-19 por ĉiuj nefaritaĵoj. /Siv

Berättelser i backspegeln

På Esperanto-Lördagen 7 mars handlade föredraget om Aira Kankkunen, som var medlem i vår förening i många år. Hon ledde den s.k. Merkreda grupo, där deltagarna övade sig att uttrycka sig på esperanto genom att skriva berättelser. Ett exempel är berättelsen *Mia testudo* ovan. Aira skrev flera böcker, bl.a. om barnaudiologi – hon var docent inom det ämnet – men även på esperanto; hon vann 1992 UEA:s pris *Nova talento*. Aira skrev också ner sina minnen från sin barn- och ungdomstid i boken *Takapeilin tarinoita* (Berättelser i backspegeln). Hon översatte aldrig boken från finska till svenska eller esperanto, men jag har översatt några kapitel till svenska. Jag ska inte här återge den berättelse ur hennes bok, som jag framförde på Esperanto-Lördagen, utan en lite kortare, *Taivaan vouhet*. /Andreas



Himla-getterna

– Ovanför ruinerna flyger det himla-getter och sjunger: ketkot, ketkot, ketkot, meddelade min bror.

– Jag hörde också deras sång igår, men jag såg dem inte, fortsatte mor.

Hurdana är getter som flyger, undrade jag för mig själv, men jag visade inte min kunskapsbrist för någon annan, för nyheten visade sig inte vara ny för dem. Jag beslöt mig för att gå till ruinerna för att titta på undret.

Ruinerna låg på andra sidan vägen alldeles nära vårt hem. De var nästan osynliga, för där växte rallarros och brännässlor som inte släpper fram nyfikna till ruinens stenar. Jag behövde inte heller gå fram till ruinerna, himla-getter flyger ju ovanför ruinerna. Jag satte mig på en sten, ett gömställe i växtlighetens skugga, och därifrån följde jag händelserna. Mycket såg jag också: Pekka,

grannens husbonde, promenerade längs en smal stig hemåt och när han gick snöt han näsan, inte så som vi hade blivit lärda att snyta oss, utan han satte sin högra tumme mot näsvingen, böjde sig i en båge och sedan hördes ett kraftigt fnysande. De sista snordropparna han strök av på skjortärmen. När jag får snuva, så ska jag experimentera med att göra så, bestämde jag mig för.

Två hästlass zigenare körde i hög fart på den allmänna landsvägen och de larmade som vanligt. Så hände en liten olycka.

– Vänta! Bakbrädan ramlade av! ropade en.

– Det gör inget, svarade kusken och körde vidare.

– Gumman ramlade av, ropade en annan.

Nu stannade kärrorna och tillsammans tog man upp såväl brädan som gumman. Sedan tog hästarna av på byvägen och sällskapet körde ljudligt ner mot strandgårdarna.

Men... det syntes inga flygande getter, bara kråkor som flaxade hit och dit och på telefonrådarna satt svalor.

Nu hördes ett bråkande! – Det var inte en himla-get, utan grannens får. Kanske hade det tråkigt i sin ensamhet.

Jag hade sett en get bara på bild. Den var som ett får, men den hade ett pipskägg på hakan. Det skulle vara en stor upplevelse att se en flygande get, funderade jag för mig själv. Den måste ha väldiga vingar.

Jag tänkte på skillnaden mellan getter och får och i mitt sinne kom en bild på den gode herden, som var bland fåren och ett av fåren bar han på sin axel. Bilden var vacker, men... där fanns bara får, inte en enda get. Men... där kunde ju inte heller vara getter! Getterna fick ju inte vara tillsammans med fåren. Dem drev man bort. På yttersta dagen samlar man fåren till höger och getterna till vänster. Fåren slipper in i himlen, men getterna fördriver man till helvetet till evig pina. Kanske det är därför de sjunger så bedrövat sitt ketkot-ketkot. Det betyder ju: Det harmar mig, det harmar mig!

Jag förstod inte situationen. De är ju himla-getter. De hade ju inte själva valt att födas som getter och de kunde ju inte bli får... eller... skulle de kunna det, om någon klippte

av deras skägg??? Om jag skulle få tag i en himla-get, skulle jag klippa av dess skägg och sedan skulle jag säga till den: – Flyg nu till himlens port och bulta på. När väktaren öppnar porten, skulle han se... ja, titta nu bara... ett får som står där, och han skulle släppa in geten i himlen, fastän det var en get. Jag njöt av mitt lyckade spratt: en get i himlen och där den skulle förbli... åtminstone tills skägget växte ut. Sedan... skulle... man kasta ut den. Men... om den skulle finna en god vän i himlen, som varje dag rakade av det skägget så som också får gör!!!

– Mariiiii! Kom och ät! Kom genast hem!

Man var tvungen att gå. Alla måste vara vid matbordet samtidigt, och jag hade redan blivit hungrig medan jag höll på med att tänka på getternas hårda öde.

Många dagar gick jag till ruinerna för att titta efter flygande getter, men inte såg jag några. Till slut tänkte jag, att de nu är i den eviga pinan och därifrån slipper de inte ut. De stackars getterna, som ofrivilligt föddes getter.

Först många år senare fick jag veta, att himla-getterna är små fåglar och att deras namn är himla-get (taivaan-vuohi, på svenska enkelbeckasin, ö.a). Men samma känsla, som jag hade som barn när jag beklagade getternas öde, har jag ännu som vuxen. Ingen har rätt döma någon annan till den eviga pinan för att han blivit född get. Himlens gårdar tillhör även getterna, de är ju himla-getter.



Merkreda Grupo.